# *Kubo kaj ?inio ratifis la volon plifortigi siajn rilatojn.*



Dum renkonti?o inter Lenin Echevarría Quintana, unua vicministro pri industrioj de Kubo kaj Liu Lihua, homologo en la azia lando,  ?inio ratifis la pretencon de sia lando da?re avanci en la komuna laboro cele al plimultigo de la industria evoluo de Kubo kies pespektivojn li bone taksis.

Siaflanke, la kuba vicministro informis pri la evoluaksoj prioritataj de la insulo, debatitaj kaj aprobitaj dum la pasinta kongreso de la komunista partio pri gravaj projektoj asocii?intaj al la teknologia aktualigo de la nacia industrio.

Amba? partneroj koincidis emfazante la progreson de la reciproka kunlaboro en la industria sektoro pri la bazo de interkomprena memorando subskribita en ?eesto de la prezidentoj de amba? landoj dum la pasinta ?tatvizito al Kubo de la prezidento Xi Jinping, kaj anka? surbaze de la Agplano por starigo de la memorando subskribita en Kubo dum la evento CUBAINDUSTRIO 2016.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/102325-kubo-kaj-cinio-ratifis-la-volon-plifortigi-siajn-rilatojn

# Radio Habana Cuba